4-a Jaro. N-o 167 APERAS  SEMAJNE 15. Decembro 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

PROBLEMOJ EL HINDIO

LA SINDIKATA MOVADO EN HINDIO

Oni ofte aŭdas, ke la Hinda Sindikatmovado "estas ankoraŭ infanaĝa". Ĉi tiu frazo esprimas malĝustan ideon. Pro tio oni senkulpigas ĉiun eraran politikon — plenan senagemecon, sekciismon, forrestadon de politiko, ktp. Aliflanke, la frazo sugestas, ke la sola ebla politiko (ag-metodo) por Hinda Laboristaro estas malrapida pacienca progreso, same kiel nuntempe. Mi ne neas la veron, ke la situacio de la Hinda Labormovado estas malbona kompare kun la situacio en la Okcidento. Sed tiu ĉi artikolo montros, ke la Hinda Sindikatmovado nun estas en la dua stadio, en kiu ĝi restos ĝis alvenos la kondiĉoj, kiuj estas necesaj por la sekvonta stadio. Oni anticipas, ke tiuj kondiĉoj baldaŭ alvenos.

La nuna situacio estas proksimume:

Okupataj en:	Milionoj
Terkulturado	100
Industrio (kaj Minado) . . .	15½
Transportado	2
Komerco	8
Mastrumaj helpantoj	2½
Publika Administrado	4

El la enloĝantaro da 300 milionoj, oni kalkulas 138 milionojn da gelaboruloj, kiuj troviĝas en la supre menciitaj okupoj.

Estas 164 sindikatoj kun 196 500 anoj. Nuntempe aliĝis 60 sindikatoj (125 000) al la Tut-Hinda Sindikata Komitato.

Necesas nun montri kiel rilatas la nuna situacio al la pasinta.

Grandskala organizado komenciĝis en j. 1918. Al la unua T-H. S. K. aliĝis 60 sindikatoj (140 000 anoj) en j. 1920, kaj oni diris, ke la anaro de ĉiuj sindikatoj, kiuj simpatiis, nombris 500 000 anojn. Dum la dua Kongreso — laŭ diroj — 1 000 000 estis reprezentita. Mi dubas pri tiu nombro, sed estas certe, ke post 1922 okazis ega malaltiĝo. En j. 1924 nur 8 sindikatoj aliĝis, sed je la kvina Kongreso en j. 1925 estis 31 sindikatoj (80 000). Depost tiu jaro la nombro firme plialtiĝas.

Dum la periodo 1919—1922 aperis intensa "ŝtrik-ondo", sed tio malaperis en j. 1924. Estas ankaŭ malsimileco inter la karakteroj de la tiamaj kaj nunaj Kongresoj. La unuaj du Kongresoj estis nure egaj manifestacioj. Ĉe la dua (1921) ĉeestis kelkmiloj da delegitoj, kaj la tieaj ministoj speciale strikis por festi la Kongreson; konataj politikaj gvidantoj ĉeestis. La skribanto ĉeestis la Kongreson dum marto 1927, kiam la delegitaro nombris malpli ol kvindek, el kiuj ne pli ol dek estis laboristoj.

S-ro R. K. Das (en sia libro "Labormovado en Hindujo") diris, ke dum la plifruaj jaroj de intensa agado, la sindikatoj similis ĉefe al la industria tipo, sed dum la plimalfrua periodo (1923) metiaj tipoj ekaperis. Tio ĉi estas notinda. Malgraŭ tio, ke la sindikatoj ne estas absolute metio-tipaj, ili tamen tre proksimiĝas al tia tipo. Nuntempe la nombro de sindikatoj plialtiĝas, sed plimalaltiĝas la suma anaro.

En organizo, konsisto, celoj, grandeco kaj metodoj, la sindikatmovado de 1919 ĝis 1922 efektive tute malsimilas al la nuna. La plifrua movado estis produkto de periodo de universala nekonstanteco kaj ekscitiĝo. Ĝi estis revolucia reago al revolucia situacio. Pro la ekonomiaj cirkonstancoj iĝis universala malkontenteco kaj protesto. Krome, la tiutempa politika ekscitiĝo, influis la laboristojn. Kompreneble, la revolucia konscio estis treege malforta, sed sendube ĝi ekzistis. Strikoj ĉie okazis. Antaŭ la strikoj, plejofte ekzistis nenia organizaĵo, sed ofte oni establis ian sindikaton post la striko. Ili ne havis konstantan anaron nek fiksitajn kotizojn; efektive oni ĝuste diris pri ili, ke "ili estas preskaŭ ne pli ol strikkomitatoj". Nuntempe restas malmulte da tiuj.

La nuna movado funkcias en kondiĉoj de ekonomia konstanteco kaj politika trankvileco. Ĝi havas grandmezure laŭmetian strukturformon, kaj estas plejparte movado de la plialtaj rangoj de laboristoj, kiuj havas treege limigitajn celojn. Preskaŭ ne ekzistas inter-sindikata organizo, nek solidareco nek klaskonscio. Ĝenerale, politika agemeco estas evitata.

En kelkaj industrioj (t. e. poŝta, fervoja, doka) estas iuj sindikatoj, kiuj celas tutlande unuigi la laboristojn ĉiurangajn. Iuj sindikatoj disrompiĝis kaj nun ekzistas apartaj organizaĵoj por hindoj kaj por eŭropanoj. Okazis multaj aliaj disrompiĝoj, pro diversaj motivoj. Ĉe la plialtrangaj laboristoj organizo estas forta kaj mezefika, sed malforta ĉe la malaltrangaj; ĉe la senkleraj ne ekzistas preskaŭ organizaĵoj. Pro senklereco estas tre malfacile organizi la nefakajn laboristojn. Kompreneble, la dungantoj preskaŭ ĉiam donas plibonajn kondiĉojn al la plialtranguloj ol al la aliaj, kaj eŭropanoj ordinare ricevas pli bonajn kondiĉojn ol la indiĝenoj.

Iuj sindikatoj aranĝas elementajn instrukursojn por siaj anoj. Iuj el la pliaĝaj sindikatoj eldonas gazetojn, aliaj

eldonas neoftajn bultenojn. Plimulto donas kvitancojn kontraŭ kotizoj, kelkaj uzas membrokartan sistemon. La plifortaj sindikatoj dungas daŭre pagatajn oficistojn, aliaj estas devigataj havi "eksterulojn".

Virinaj organizaĵoj preskaŭ ne ekzistas. Ekzistas nuntempe kvar Laboristkamparanaj Partioj, kiuj jam influas la Labormovadon. Ili propagandas por vigligi la sindikatojn kaj por establi veran Metiaran Konsilantaron. Plejparte ili estos bazataj sur la "plimalaltrangaj" laboristoj, kaj verŝajne ili sukcesos solvi la ankoraŭ nesolvitan problemon pri la organizado de la plejmulta parto de la hinda Laboristaro.

En politikaj rondoj oni klare komprenas la estontan gravecon de la Labormovado. Lastatempe reaperis du gvidantoj, kiuj dum kelkaj jaroj restis ekstere de la Labormovado — Chaman Lal, kaj Lala Lajput Rai. La unua denove sin aliĝis, ĉar li komprenas, ke burĝa naciismo mortis kaj la estontan luktadon faros la Labormovado. La dua revenis pro precize mala motivo — li antaŭvidis la danĝeron al la burĝaro kaj volis forpeli tion[1]).

La batalo inter Naciismo kaj Imperiismo por kapti la Labormovadon komenciĝas. Kiam tio plene estos evoluiĝinta, tiam komenciĝos la sekvonta stadio en la historio de Hinda Laboristaro.

Artikolo de *Philip Spratt*, aperinta en angla gazeto "Labour Monthly", Oktobro 1927. Tradukita de *S. H. Brooks* (SAT 8500). La verkinto de la supra artikolo estis arestita pro la de li verkita broŝuro "Hindujo kaj Ĉinujo".

ANKORAŬ PRI "MOTHER INDIA" ("PATRINO HINDIO")

Oni povas mensogi, citante nur verajn faktojn kaj se oni elektas la lastajn el granda faktaro kaj prezentas ilin kiel la tutaĵon. Evidente, laŭ "The Indus", ĵurnalo de Londona hinda studentaro, kaj leteroj de Gandhi kaj aliaj en "Manchester Guardian", tiel faris F-ino K. Mayo, kiam ŝi verkis la libron "Mother India", kiu atakas hindojn kiel "minacon al la mondo" kaj subtenas la britan regadon en Hindio tiom, kiom ŝia libro "The Isles of Fear" (La Insuloj de Timo) subtenas la usonan regadon en la Filipininsuloj. Ŝajne F-ino K. Mayo iris en Hindion kun la celo vidi nur tiujn faktojn, kiuj taŭgos por sia objekto kaj en tiu celo ŝi estis helpata de la Britia Registaro.

[1]) La frazon ni ne komprenas. *Red.*

Plue, ŝiaj izolitaj faktoj estas ofte ne nur troigitaj, sed ne veraj. Ekz. ŝi citas diraĵojn de personoj, tiom konataj kaj respektataj, kiel Gandhi kaj F-ino Bose, kiujn ili neas. Tagore ankaŭ estas de ŝi menciata kiel persono, kiu aprobas infanedziĝon, sed estas fakto ke li konsilas ne infan-edziĝadon, sed *fruan* edziĝon.

La multaj reformistoj en Hindio jam delonge konstatis la malbonaĵojn ekzistantajn en ilia lando kaj fals-fokusigitajn de K. Mayo; ili luktas mem por aliigi la staton, kiun evidente la Britia Registaro aŭ ne atentis aŭ malsukcesis plibonigi dum sia sufiĉe longa regado.

La libro de K. Mayo estigis en Hindio furiozan indignon, kaj pro ĝi grandegaj protest-kunvenoj okazas. Ĝi ankaŭ pliigis malamon de hindoj kontraŭ Usono, kiu ekstertenas ilin, dum usonanoj libere sin movas en Hindio. Ni konsilas, ke K. Mayo verku alian libron; sen troigo ŝi trovus bonan materialon por sia "reformemo" en lando de "lynch-law"[1]); de disetendita subaĉetado kaj politika putreco; de laŭleĝa fimortigo; de adorego al "la *ĉiopova* dolaro" kune kun kruda religia superstiĉo.

Oni lasus sian sorton pli konfide en la manoj de la ĝentilaj, pacemaj hindoj — eĉ se ili ankoraŭ kredas al kelkaj strangaj kuraciloj — ol en tiuj de la pli sovaĝaj regantoj de Usono. *E. K. L.*

LA VERA MINACO DE LA HINDOJ

Ĉe la oka kunsido de la Tut-Hinda Sindikata Komitato, unu el la britaj fratecaj delegitoj, Purcell, parolis jene: "La labor- kaj viv-kondiĉoj de la laboristoj kaj kamparanoj de Hindio estas tiaj, ke ili minacas la civilizacion. La kotonfabrikoj de Lancashire (Anglio) funkcias *32* horojn en semajno, tiuj de Hindio 60 horojn. En preskaŭ ĉiu industrio en Hindio, la laboristoj laboras proksimume duoble pli longe ol la laboristoj en simila industrio de Britio, Eŭropo aŭ Ameriko. Rilate salajrojn, la afero estas eĉ pli miriga. Estas eble dungi 6—12 virinojn en la hindaj koton-fabrikoj por salajrsumo, kiun oni pagas al unu virino en la anglaj fabrikoj. La brita ministo ricevas dekoble pli grandan pagon ol la hinda, kvankam la unua estas en konstanta lukto kontraŭ la mastroj por ricevi pli altan salajron "sufiĉan por la vivo". F-ino K. Mayo evidente volis kapti kulon kaj englutis kamelon. La ne-hinda Laboristaro pli bone atentus la gravajn faktojn ol ŝiajn rakontojn, tiamaniere ĝi utilus al la hindaj K-doj kaj al si mem ankaŭ.

[1]) Elp. linĉ-lo; eksterleĝa atako kontraŭ malliberigitoj, ĉefe kontraŭ negroj.

La Kinoaŭtomobilo

La General Motor Company de *Detroit* (Dzseneral Motor Kompany — Detroá) kiu fabrikas Buick- (Bjuik)- kaj Chrysler- (Krizler) aŭtomobilojn, *faris interesan kontrakton kun Sovetio.* La amerika aŭtomobilkompanio liveras t. n. *kinoaŭtomobilojn* al la soveta registaro. La komisiituloj de l' registaro kun ĉi tiuj aŭtomobiloj traveturas tutan Sovetion kaj precipe vilaĝojn, kaj la pli malgrandajn urbojn, kie ankoraŭ ne estas kinoj kaj tiu loke ili aranĝas *propagandprezentadojn.*

La soveto ricevis provizore *15 aŭtomobilojn;* pluaj nun pretiĝas en Detroit. *Valoro de l' mendo superas okcentmil dolarojn.*

Antaŭ kelkaj semajnoj oni liveris unu al Sovetio ekspedatan aŭtomobilon al la urbo Berlin kaj la ĉi tiea trusto de l' aŭtomobil-fabrikoj invitis ĵurnalistojn por ke ili vidu la kinoaŭtomobilon starantan sur Lehrter (Lerter)-placo. *La amerika maŝinmiraklo estis preskaŭ unu kaj duoble pligranda ol ampleksa aŭtobuso.* Malantaŭ la gvidmaŝino estas *suplementvagono,* kiun la aŭtomobilo trenas kun si kaj kiu dum la kinoprezentado estas malvaste kroĉigebla al la granda aŭtomobilo.

Ducentsepdekkvin personoj havas samtempe lokon en la interno de l' aŭtomobilo, kiam ĝi estas finaranĝita por prezentado. Kompreneble dum la prezentado la larĝeco de l' aŭtomobilo estas konforma al tiu de normala kinejo. En la suplementvagono estas la projekciaparato kaj la tuta maŝinejo. La elektran fluon bezonatan por la projekcio *oni produktas per la motoro de l' aŭtomobilo* kaj tiu ĉi motoro ekfunkciigas ankaŭ *la meĥanikan orkestron,* kiu *la antaŭe kompilitajn muzikaĵojn* ludas paralele kun la projekciado de l' filmo.

H. J. Walpole, eŭropa reprezentanto de l' General Motors rakontis al nia raportisto la historion de ideo pri konstruado de l' kinoaŭtomobilo.

—Dum la direkcia kunsido de l' Universal Artist, la plej eleganta filmfabriko de Ameriko, unu el la plej popularaj aktoroj kaj ĝia ĉefakciulo *Douglas Fairbanks* esprimis la ideon, ke estas necese projekti kaj konstrui kinoaŭtomobilojn. Li pensis al *Sovetio, kie nur je proksimmume kvincentmil homoj troviĝas unu kinejo.* Estas provincoj, kie kino estas *tia novaĵo, kiel ĝi estis ĉe ni antaŭ dudek jaroj.* "Mi rememoras, kiam dum *mia, junaĝo* — diris Fairbanks — *en Kalifornio migradis la unuaj primitivaj kinoj, kiel cirkoj.*"

La posedantoj de la unuaj migrantaj kinoj, prezentadis filmojn sub ia tendo aŭ en drinkejo kaj pergajnis multe da mono, kvankam la aparatoj kaj la filmoj estis malbonaj. — Ĉu ne estus do eble ripeti la heroepokon de l' kino en pli moderna formo?" Du semajnojn poste

fondiĝis en la kadro de *General Motor Company*, la kompanio de kinoaŭtomobiloj. Ĝian kapitalon de 1 000 000 da dolaroj kovris *Douglas Fairbanks*, lia edzino *Mary Pickford*, la aŭtokompanio kaj kelkaj unuarangaj financistoj.

Baldaŭ estis preta la unua modelo. Delegito de la Kompanio veturis Sovetion por trakti la aferon kun la soveta registaro, ĉar ŝajnis al la Kompanio, ke ĝi estas la lando, kiu pleje bezonas kinoaŭtomobilojn. Preskaŭ samtempe venis Nov-Jorkon unu gvidanto de l' filmsoveto por aranĝi la vendadon kaj transprenon de sovetaj filmoj en Ameriko. La gvidanto de filmsoveto povis do vidi la aŭtomobilon. Post mallonga tempo kontrakto estis signita per kiu la soveta registaro aĉetis kinoaŭtomobilojn je 800 000 dolaroj.

Ni eniru ĝin por partopreni filmprezentadon. La projekci-tolo estas iom pli malgranda ol la ĝenerale uzata, sed la projekcio estas tiel same perfekta kiel en plej eleganta kinejo. La plej granda avantaĝo de kinoaŭtomobilo estas ĝia rapida — nur 20 minuta — finaranĝo por prezentadoj. Dum unu tago ĝi do povas doni prezentadojn en du ĝis tri vilaĝoj ĉu farmoj.

El "*Peŝti Napló*", hungara burĝdemokrata taĝjurnalo tradukis: *Kolektivano.*

MIA BUĜETO

Laŭ ekzemplo de aliaj SAT-anoj mi ankaŭ kun ĝojo volas montri mian buĝeton.

Mi ne estas iu ĉefulo, aŭ iu supera oficisto, mi do ne ricevas grandan salajron, ĝi estas egala ĉiumonate, sen iu ajn ŝanĝemo.

Mi devas aldoni, ke por fraŭlo, senfamiliulo, la salajro estas sufiĉa por modesta vivo, sed oni ne devas forgesi, ke multaj el malsuperaj poŝtistoj estas salajrataj plimalalte ol mi (ekz.: kurieroj leterportistoj, gardistoj, ktp.) krom tio kelkaj havas familianojn-senlaborulojn por vivteni. La vivo de la lastaj ne estas enviinda pro la neceseco de nelacigebla lukto por ĉiutaga ekzisto.

Jen la ciferoj de mia monatbuĝeto:

		Rubloj	Laŭprocente
ENSPEZOJ:	unumonata salajro	62,0	
ELSPEZOJ:	por loĝejo (luo de ĉambreto)	10,0	16,0
	„ tagmanĝoj en socimanĝejo	20,0	32,5
	„ teo, sukero, pano, butero ktp. por manĝi hejme matene kaj vespere	8,0	13,0
	„ membrokotizo al profesia unuiĝo, helpkaso	2,0	3,0
	„ abono de enlandaj revuoj	1,0	1,5
	„ diversaj esp. elspezoj: membrokotizoj por SAT, SEU, abono de "S-ulo", "S. Revuo", enlandaj esp. revuoj, afranko de korespondaĵoj, mendoj de literaturo ktp.	3,0	5,0
	„ helpo al familianoj (maljuna patrino)	4,0	6,5
	„ teatroj, kinoj kaj ceteraj plezuroj, necesaĵoj	4,0	6,5
	„ banejo kaj lavistino	2,5	3,5
	„ vestoj	8,0	13,0

Medicinan helpon mi havas senpage.

Por aĉeti veston mi prenas prunte ĉe helpkaso necesan monon, kiun mi devas repagadi dum kelkaj monatoj.

Kiel oni povas vidi, mia buĝeto estas severa kaj mi nepre devas vivi laŭ ĝia limo.

Feliĉe mi estas kontraŭulo de alkoholo kaj tabako, sekve la elspezoj por ili forestas en mia buĝeto.

Por kompreni la valoron de mia salajro permesu al mi noti jenajn prezojn:

	Rubloj
1 kg. da nigra pano	0,10
1 „ da blanka pano	0,21
1 „ da sukero	0,71
1 „ da butero	1,80
1 „ da fromaĝo	1,40
1 paro da ŝuoj (meza prezo)	13,—
Ĉemizo (meza prezo)	5,—
Kostumo (meza prezo)	50,—

A. Erjuĥin (9682), Arĥangelsk, USSR.

TAGO EL MIA VIVO

Je la kvina horo matene mi leviĝas, min vestas, kaj, manĝinte iom, eliras minejon. Ĉe la lampejo mi ricevas oleo-lampon (tie-ĉi oni ankoraŭ ne uzas la elektrajn lampojn jam uzatajn aliloke), kaj enviciĝas kun miaj kolegoj apud la ŝaktofaŭko por malsuprenveturi per la granda lifto. Dum la somero oni apenaŭ povas tuj vidi, kiam oni eniradas la minejon, pro la subita ŝanĝo de sunbrilo en mallumon lumetigatan ie kaj tie per la okulondifektigaj flavaj flametoj de la malnov-modaj oleolampoj. Proksime de la ŝaktofundo troviĝas vagonetaro, per kiu mi kun multaj aliaj sklavoj veturas laŭ la longa deklivo ĝis la vojet-kuniĝo, kie oni disiras piede al la diversaj laborlokoj. La varmo jam estas sentebla. Baldaŭ mi demetas la jakon kaj veŝton. La spirado mem iĝas malpli facila, kaj kiam oni alvenas al sia laborloko, oni ŝatus demeti ankoraŭ pli da vestoj kaj kiel eble plej malvarmetiĝi. Je la sepa matene komenciĝas la laboro, — karbo, karbo, karbo. La produktado de karbo postulas la koncentrigon de la menso. Tiom da horoj pasigataj ĉiutage je streĉiga laboro, en mallumo kaj danĝero, kie oni ne devas pripensi ion ajn krom la produktado, ĉio ĉi nature stultigas la laboriston. La lacegiga laboro senigas lin je la volo kaj energio al sinklerigado. La cerbo kaj spirito ne volas respondi escepte al malseriozaĵoj. Ĉu ne estas abomeninde, ke tiaj kondiĉoj ekzistas en tiel-nomata "civilizita lando"?



Ĉar mi jam antaŭe priskribis en "S-ulo" la tipon de mia laboro mi kredas, ke estus superflue tion ripeti. La laboro finiĝas je dek minutoj antaŭ la tria posttagmeze kaj mi reiras al la tersupraĵo sammaniere kiel mi venis de tie.

Mi alvenas hejmen ĉirkaŭ la kvara, tagmanĝas, lavas kaj alivestas min. Tiam komenciĝas la por mi plej interesa parto de la tago. Estante studema, mi legadas ĉu angle, ĉu esperante, ĉu germane. Kelkfoje mi vizitadas teatron, koncertojn kaj laboristan klubon. Certe la laboristo meritas iom da plezuro, ĉu ne vere? Sed nuntempe en Anglio multaj industrioj funkciadas nur tri tagojn ĉiusemajne, kiel ankaŭ la karbmina industrio. El tio rezultas la plej plendindaj vivkondiĉoj. Oni devas kontentiĝi per la malplej karaj necesaĵoj. Ŝuldoj amasiĝas. Pli kaj pli la homoj postulas ŝtatan kaj urban subvencion. Malkontento ĉiutage pli kreskas.

William Henthorne (7382).

Se vi deziras profundiĝi en la materion de "Sennaciismo", vi nepre aĉetu kaj legu la 2-an eldonon de

A. B. C.
de Sennaciismo

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof,* aranĝis *L. L. Zamenhof.*

Unu volumo in-8, 82-paĝa
Prezo: 1,50 mk. g.
Adm. de SAT.

La ekonomia situacio en Bavario

Bavario estas lando agrikultura. De ĝia loĝantaro (7 400 000) pli ol la duono estas okupita en la agrikulturo. Laŭ la agrikultura entreprenej-nombriĝo (la 16-an de junio 1925) en la agrikulturo de Bavario estis okupitaj entute 1 698 780 personoj. Inter tiuj estis 938 349 helpantaj gefamilianoj, 439 480 memstaraj, 314 349 laboristoj kaj 6 348 oficistoj.

Laŭ la sama entreprenej-nombriĝo estas kalkulita agrikulture uzita, prilaborita tut-areo kun 5 757 808 hektaroj. Tiuj dividiĝas je 666 268 entreprenoj. Iom pli ol triono da ili estas malgrandaj entreprenoj kun 2 hektaroj. Et-agrikulturistaj entreprenoj kun 2—5 hektaroj estis 172 296, mezgrandaj kun 5—20 hektaroj estis 220 848, grandagrikulturistaj kun 20—100 hektaroj estis 32 670 kaj grandbienulaj kun pli ol 100 hektaroj estis 551. Per tio evidentiĝas, ke la duono de la agrikulture uzita areo apartenas al mezgrandaj entreprenoj. De la mezaj kaj grandaj agrikulturaj entreprenoj nur 80 % laboras sur propra grundo. La resto estas farmoj. De la grandbienoj 16,3 % de ĉiuj entreprenoj estas luitaj. De la agrikultura Laboristaro 80 % apartenas al la mastrumo de la agrikulturisto aŭ bienposedanto; 15 % de la ter-laboristaro tute ne posedas grundon.

El tiuj ciferoj parolas la eminenta signifo de la meza kaj granda agrikulturistanaro en Bavario; sed ankaŭ la laŭnombra forto de la agrikultura Laboristaro.

Rilate al la industrio en Bavario estas rimarkinda jena: Dum en la respubliko Saksio kun loĝantaro de 5 000 000 en la industrio estas okupitaj proksimume 850 000 laboristoj, — Bavario kun sia loĝantaro de preskaŭ 7 400 000 nur havas proksimume 720 000 industri-laboristojn, laŭ pli malvasta senco de la vorto. (Tiuj ĉi ciferoj kaj la sekvantaj validas por laboristoj laborantaj en entreprenoj kun maŝina forto).

Dum 1925-a jaro ekzistis laŭ la kalkuloj de la bavaria ministrejo por sociala prizorgo entute 1 008 983 "laborprenantoj" (laboristoj kaj oficistoj) en Bavario.

La sekvantaj ciferoj estas ĉerpitaj ĉiuj el la jara raporto de la bavariaj metiinspektoroj por la jaro 1925-a. De tiuj "laborprenantoj" pli malvastsence estis laboristoj (salajruloj) 853 327. En la opaj industrioj estis okupitaj dum 1925-a jaro:

Industrio	labor-prenantoj[1]	labor-istoj
Fer- kaj metalproduktado	17454	16006
Fer-, ŝtal- k. metalvar-fabrikigo	66235	61923
Maŝin-, aparat- kaj veturil-konstruo	101855	86229
Ĥemia industrio	42571	32021
Teksindustrio	79093	73830
Konstruindustrio	96116	92953
Minej-ekspluatado	—	13019

Per tiu ĉi tabelo evidentiĝas, ke la nombro de la laboristoj en la fakta pezindustrio okupitaj estas malgranda proporcie. Se oni konsideras la dividon de la Laboristaro laŭ la grandeco de la entreprenoj, tiam la samo konfirmiĝas:

	labor-prenantoj	labor-istoj
Entreprenejoj kun 49 okupitoj	412583	342879
Entreprenejoj kun 50 kaj pli da okupitoj	596404	510448

Laŭ la diversaj industrioj estis okupitaj:

Industrio	Entreprenoj kun laborprenantoj 50 kaj pli	malpli ol 50
Fer- kaj metalproduktado	15793	1661
Fer-, ŝtal- kaj metalvar-fabrikigo	41641	24594
Maŝin-, aparat- kaj veturil-konstruo	84458	17397
Ĥemia industrio	37938	4634
Teksindustrio	71428	7665
Konstruindustrio	40641	55475

Kiam oni esploras la opajn distriktojn je la signifo de iliaj industrilaboristaroj, tiam rezultas jena bildo: Okupitaj estis en la industrio:

Distriktoj	labor-prenantoj	labor-istoj
Sudbavario (München, Supra bavario lando, Malsupra bavario, Ŝvabio)	394077	325388
Nordbavario (Oberfranken, Nürnberg-Fürth, Mittelfranken, Unterfranken, Oberpfalz)	462410	377550
Pfalz (Pfalz norda, Pfalz suda)	153400	129166

El tiu ĉi tabelo jam rezultas, ke la norda parto de Bavario sufiĉe pli estas industriigita ol la suda. Tiu bildo ankoraŭ pli evidentiĝas, kiam oni komparas la grandecon de la entreprenoj en la opaj

[1]) La ciferoj montras la nombron de laboristoj kaj diversaj oficistoj.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo naŭa)

La spiritostato de egiptoj ne permesis normalan adaptiĝon al la necesaj, novaj kondiĉoj. La kadavra religio akiris en ilia vivo tioman gravecon, ke preskaŭ la tuta energio de l' popolo estis foruzata por servado al la morto. La tero pli kaj pli loĝatiĝis de mortintoj. Apud ĉiu urbo estis grandega mortintejo, kie mumie konservitaj kadavroj kvazaŭ spitis la tempon kaj uzurpis spacon al la vivantoj.

Estis tempo, kiam, laŭ la kredo de l' popolo, nur la faraono kaj kelkaj eminentuloj ĝuis senmortecon. Sed post revolucioj, per kiuj la popolo akiris diversajn rajtojn sociajn kaj religiajn, estiĝis kredo, ke eĉ la plej simpla plebano ankaŭ povas, post sia morto, fariĝi ia dio. Sed por tio necesis zorge konservi la kadavron. Tial ĉiu egipto laboradis por prepari al si taŭgan tombon kaj kiel eble plej luksan sarkofagon.

Ĉe tia konstato ĉu oni povas nei la forton de ideoj? Ni memoras pri tio, kiam temos diskuti pri la naciisma ideologio nuntempa, kiu simile riskas pereigi la eŭropan civilizacion per sia maladaptiĝo al la modernaj produktokondiĉoj.

El tiu ekrigardeto sur la historion de la antikva Egiptio ni notu bone en la memoron, ke la geografio antaŭmetas kondiĉojn al la socia vivo, ke la ekonomiaj fortoj puŝas la homojn al pli kaj pli larĝa unuiĝo, ke la Ideologio ĉiam malfruas rilate al la Ekonomio, ke se fine ne okazas adaptiĝo inter tiuj du fortoj povas iu civilizacio perei.

La Patriotismo ĉe la antikvaj grekoj kaj italoj

Ĉe tiu ĉi parto de nia studo ni konsideras socistaton, kiu jam preterpasis la klanan stadion kaj atingis la familian. Ni trovas homojn, havantaj religion nure hejman. Ĉiu hejmo ja havis siajn propraјn diojn, kaj ili akceptis la adoradon nur de la hejmanoj mem. Tiuj dioj estis la prauloj de la familio.

La antikvaj grekoj kaj italoj kredis, ke la animo daŭras vivi en la mortinta korpo. La ritoj de la entombigo montras klare, ke kiam oni metis korpon en tombon, oni kredis meti en ĝin ion vivan. Tial Virgilo diras pri la funebra ceremonio de la entombigo de Polidoro: "Ni fermas la animon en la tombon." Saman esprimon oni renkontas ĉe Ovidio kaj Plinio la Juna.

La kutimo postulis, ke ĉe la funebra ceremonio oni voku trifoje la animon de la mortinto per la nomo, kiun li havis. Trifoje oni diris al la animo: "Estu bonfarta, la tero estu al ci malpeza."

Hodiaŭ oni ankoraŭ uzas similajn esprimojn, kvankam neniu plu kredas, almenaŭ ĉe la kulturitaj popoloj, ke vere la animo restas viva en la morta korpo. Religianoj kredas, ke la animo forlasas la korpon kaj forflugas ĉu en ĉielon, ĉu en inferon. Sed tamen kreduloj kaj nekreduloj daŭras uzi esprimojn, kiuj en la buŝo de la antikvaj grekoj kaj italoj havis plenan signifon. La antikvuloj tiom forte kredis, ke iu daŭras vivi sub la tero, ke ili metis kun li en la tombon la objektojn, kiujn li povus bezoni. Ili surverŝis vinon sur lian tombon kaj tien deponis por li nutraĵon. Oni eĉ buĉis ĉevalojn kaj sklavojn por entombigi ilin kun la mortinto, por ke ili servu al li[17]).

Pro tia kredo la antikvuloj tre zorgis

[17]) Saman kredon oni trovas ankoraŭ nuntempe ĉe kelkaj "primitivaj" popoloj, ekzemple ĉe la koriakoj el Kamĉatka (USSR) laŭ raporto de Sten Bergman, estro de sveda ekspedicio, kiu esploris la landon en 1920/21.

distriktoj unuj kun la aliaj. En entreprenoj estis okupitaj:

Distriktoj	Entreprenoj kun laborprenantoj	
	50 kaj pli	malpli ol 50
Sudbavario	209363	184714
Nordbavario	280981	181429
Pfalz	105960	47440

Dum la Laboristaro en malgrandaj entreprenoj de norda Bavario kun malpli ol 50 laboristoj reprezentas nur proksimume 65 % de la Laboristaro en grandaj entreprenoj, en la suda Bavario ĉi tiu procento atingas preskaŭ 100. Pli forta estas eĉ la superregado de la grandaj entreprenoj en Pfalz kun ĝiaj grandegaj farb- kaj ŝufabrikoj. Aliiĝas tio, ke en norda Bavario antaŭ ĉio regas la pezindustrio, dume en la suda Bavario, escepte München'on, unuavice kaj ĉefe la teksindustrio.

Tiuj ĉi ciferoj ankaŭ estas la klarigo por la politika diferencigo en la opaj distriktoj. Dum la proporcie malforte industriigita sudo estas la centro de la bavaria popolpartio (ĉefe rom-eklezia), la pli forte industriigita nordo kapablis, kaj ankaŭ Pfalz, disrompi parte la fronton reakcian. Pro tio la politika evoluo de Nordbavario por la reakciema bavaria registaro estas averta "Mene Tekel" rilate la estontan evoluon de Sudbavario. Ĉar per la antaŭenpaŝanta industriigo ĉiam pli kaj pli estas forprenata al la reakcio la sociala fundamento, pro tio la bavaria registaro ĉiurimede provas malakceli kaj malhelpi la industriigon de Bavario.

Laŭ la "Neue Zeitung" ("Nova Gazeto") en München, tradukis *Milok Centdek.*

Situacio de la macedoniaj tabakkulturistoj

Kvankam nesperta esperantisto mi provos tamen priskribi al vi fidele la situacion de ĉi tieaj tabakkulturistoj.

Per la tabakkulturo sin okupas ĉiuj: de la blindaj maljunuloj ĝis eĉ malpli ol okjaraj infanoj.

Jen kiel laboras tabakkulturisto:

Jam je la 2-a matene li ellitiĝas, rapide sin lavas kaj vestas kaj tuj foriras tabak-kampon. Kvankam estas mallume li tamen rikoltos ĝis la 7-a. Matenmanĝinte iom da pano kaj da papriko li komencas purigi la tabakon kaj tio daŭras ĝis la 9-a. Reveninte hejmen li surfadenigas ĝin ĝis la tagmezo. Post unu horo, kiu servas al tagmanĝo kaj ripozo, li daŭrigas la surfadenigon ĝis la 5-a aŭ 6-a vespere. Kaj ankoraŭ dum unu aŭ du horoj li preparas la t. n. surfadenigan sekadon.

Kiel vi vidas la laboro estas longa kaj tre laciga. Laborante tiel dum la tuta jaro, krom kvarmonata libertempo, li ellaboras 250 kg. da tabako. Por tiom da tabako oni bezonas kampon de proksimume 2000 m². La farmpago estas 500 dinaroj, por plugado oni elspezas 450 din., la akvigado de la kampo dum la plantado kostas 200 din., fadenoj 50 din., sume oni elspezas 1200 din.

Kiel vi scias, la tabakaĉetado estas monopoligita de la ŝtato. La pasintan jaron la ŝtato pagis 14 din. po 1 kg. da tabako. Do, unu tabakkulturisto labor ante diligente dum 8 monatoj povas akiri por sia tabako 3500 din. Forkalkulante la elspezon de 1200 din. restas al li nur 2300 din. Jen la mizera stato de tabakkulturisto.

Ekzistas ankaŭ riĉaj "tabakkulturistoj", kiuj havas grandajn kampojn, kiuj dungas laboristojn kaj kiuj scipovas vendi sian tabakon je pli bona prezo: ili simple subaĉetas la komisionojn. Tiel aspektas la kapitalistaj "tabakkulturistoj".

Prilep (Jugoslavio). *D.*

pri la entombigo de la kadavro, por ke la animo havu taŭgan restadejon. Sentomba animo vagis mizere kaj malbonfaris al vivantoj. El tiu kredo devenas la nun ankoraŭ ekzistanta kredo al la fantomoj. La antikvaj verkistoj montras klare kiom forta estis la kredo al la neceseco de entombigo por la kadavro. La tiutempuloj ja malpli timis la morton ol la mankon de tombo. Atenaj generaloj estis kondamnitaj al morto, pro tio, ke post batalo, ili malzorgis la enterigon de la kadavroj. Tiuj generaloj kredeble estis jam influitaj per la instruoj de la filozofoj kaj ne atentis la popolan kredon. Tia malatento kaŭzis ilian ekzekuton. La plej granda puno tiutempa estis la kondamno je senigo de enterigo. Ĝi estis kvazaŭ ĉiama puno, ĉar oni kredis, ke la animo de la mortonto eterne vagados mizere kaj sufere.

Ĉiu familio havis sian propran tombejon. Tie oni solenis la ceremoniojn kaj datrevenojn. Tiel la prauloj daŭre restis inter siaj familianoj. Ĉi tiuj lastaj petis al la diiĝintaj mortintoj helpon kaj konsilojn en gravaj okazoj.

"Tiel la religio ne loĝis en temploj, sed en la hejmo; ĉiu havis siajn diojn; ĉiu dio protektis nur unu familion kaj estis dio nur en unu hejmo. Oni racie ne povas supozi, ke tia religio estis konigita al la homoj de pastroj kun forta imagokapablo. Ĝi naskiĝis spontane en la homa spirito; ĝia lulilo estis la familio; ĉiu familio kreis siajn diojn[18])."

(Pluo sekvos.) *E. Lanty.*

[18]) *Fuste de Coulanges:* "La Antikva Civito."

Preseraroj

Plejofte la sencon de frazoj ne aliigas preseraretoj, tial ni ne kutimas ilin mencii. Sed en la n-o 165, en la lasta kolono de ĉi tiu artikolo, ĉe la 9-a linio, de malsupre, necesas korekti la vorton "konforma"; devas esti *kojnforma.* La manko de nur unu litero ja tute ŝanĝas la signifon de la vorto.

Ĉi-okaze mi aldonu, ke en la manuskripto mi ĉiam uzis la vorton "procezo". Kredeble la korektisto opiniis, ke tie kuŝas plumeraro kaj bonintence anstataŭis la *z* per *s.* La vorto *procezo* troviĝas en la vortaro de *Boirac* (Buarak) kun la proksimuma senco de irado, malvolviĝo, progreso, evoluado (lat. processus). Eble oni povus plilarĝigi la sencon de *proceso* por eviti la enkondukon de nova vorto. En ĉiu ajn proceso oni ja ankaŭ povas konstati iradon, progreson de juraj procedoj.

Sed mi ne volas uzurpi la kampon de la fakuloj; eble kelkaj konsentos konigi sian opinion. *E. L.*

LEGENDO

Maljuna avino, diru al mi iun el viaj belaj legendoj.

— Sed, mia knabeto, vi postulas tiajn ĉiumomente, kiam mi sidiĝas; mia provizo estas malgranda, kaj mi jam ĉiujn rakontis al vi ofte.

— Avino, tio ne gravas!

— Kiun vi volas, infano mia?

— Diru al mi la historion de Homo.

— Iam estis, dum la Roma epoko,
Homo, kies vido de l' mondo ribeligis.
Li serĉis vane, kial vintre, somere,
La unuj restis kurbiĝantaj
Sur siaj lacigeblaj laboroj,
Dum, senhonte la aliaj,
Malkuraĝaj, malbonmoraj, drinkemaj,
Malviglecaj kuŝadis en palacoj...
Kaj la homo komprenis, ke la mondo
estas malbona... Ho ve! li diris al si,
La unuaj naskiĝas sklavoj,
Kaj la aliaj grandaj sinjoroj;
Kial ĉi tiu freneza lukso,
Malspritega, kiu nin spitas, nin,
La mizerulojn, kies frunto
estas kovrita per ŝvito?
Kial, tiu, kiu kreskigas la flavruĝan
Grenrikolton, mortas iafoje de malsato,
Dum la malbenitaj Cesaroj malhumilege
paradas en la supermezura ĝojo
naskiĝanta en ilia festeno?
Li serĉis longtempe diveni la enigmon,
Sed li ne sukcesis:
tie la samaj turmentoj...
tie ĉi la samaj krimoj...
Kelkaj mastroj kondukantaj
Armeon de punlaboruloj. —
Tiam, kiam li komprenis, ektremego
de indigno igis lin rompi siajn ĉenojn;
Li stariĝis tutrekte, kaj al la Mondo
surprizita, li brukriis, la unua,
la homan dekadencon.
Li briligis en la okuloj ĉi tiun lumigilon:
"Libereco"
Li rebruligis la mortantan fajron
De la konscienco, kaj ŝirante la
Vualon malhelan de la Kredoj,
Kreis la unuajn ribelemulojn. —
Kiel tiom da aliaj, kiuj sekvis,
ĉi tiu unua Homo estis venkita. —
...Sed nova popolo naskiĝis
sur lia martireco kaj konservis
lian superbelan nomon...
Spartakus!

El "Anarkista Revuo" trad.: *Marceau, Paris.*

TRA ESPERANTIO

Ĉiuj gravaj proletaj organizoj uzos esperanton!

"Oni devas kiel eble plej klopodi, por ke la lingvo tuj utilu."

E. LANTY. — "For la Neŭtralismon."

Baldaŭ estos jam jardeko de postmilita laborista mondlingva movado: Antaŭ ni stariĝos la severa demando, ĉu ni faris *ĉion* eblan por sukcesigi nian movadon, ĉu ni uzis *ĉiujn* taŭgajn rimedojn por vivigi la larĝan uzadon de esperanto en la proletaraj vicoj...

Sed se nunmomente ni ne pliviglios niajn klopodojn por sukcesi ĉie, kiel tio estas ebla, ni devas respondi al la demando nee.

Ni devus esti almenaŭ sukcesintaj, ke iel ĉe ĉiu prolet-asocia centrejo esperanto estiĝu lingvo komprenata. Ne nur en la plimulto de l' organizoj, sed eĉ ĉe multaj el ili, *voĉdonintaj por esp-o,* la lingvo ne estas uzata: letero tien sendata en esp-o restas sentraduke, do ankaŭ senresponde. Kaj tio *nur pro nia propra kulpo:* ĉar ni ne starigis iun sistemon por ebligi la interrilatojn.

La metodo de laboro per **volontuloj-tradukistoj,** skizita en "*S-ulo*" (n-o 160, pĝ. 30), tial devas brile solvi la problemon.

La ĉefa merito de ĝi kuŝas en tio, ke **ĝi estas facila kaj simpla,** kaj per *malmultaj fortoj* ĝi eblas venigi multajn fruktojn bonrezultajn, ĝi simple kaj bone efikas...

Ĉu nur malmultaj el ni scias la ĝenerale-konatan fakton, kiel triumfanta armeo okupas novan teritorion? Plej ofte anstataŭ dispolvigi siajn fortojn por okupi *ĉiujn ajn* punktojn, ĝi — *male* — zorgas precipe, ke la fortoj estu ĝuste uzataj por okupi *severe elektitajn punktojn,* gravajn urbojn, komerc-centrojn, "komunikiĝ-nodojn", respektive punktojn, kie interkruciĝas gravaj trafik-voj-

Ĉe la Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, estas havebla

la unua volumo de

LA MIZERULOJ

la majstroverko de la genia aŭtoro Victor Hugo, esp-igita de *Centezimala.*

"La Mizeruloj" estas verko, kiu enhavas serion da ĉiuspecaj sociaj dramoj, skizitaj de l' artisma mano de filozofia romanpoeto; ĝi estas

verko, el kiu ĉiu frazo enhavas pensigan penson;

verko senfine diversa laŭ enhavo kaj brilanta laŭ stilo;

verko, kiu abundas de kortuŝantaj, neforgeseblaj scenoj de granda tragedia forto kaj prenitaj el la realeco;

verko, kiu prezentas trezoron de filozofiaj meditoj pri homoj kaj pri aferoj, kaj kiu enhavas ĉiujn literaturajn formojn de la idilio ĝis la epopeo;

verko, fine, de nesuperebla beleco, kiun oni ne nur kuntrenate tralegas, ĵetate de unu emocio en alian — sed kiun oni centfoje relegos ĉiam trovante novajn belaĵojn.

La prezo de ĉi tiu 248-paĝa volumo estas nur 1.20 g. mk. inkluzive afrankon. Mendu do senprokraste!

oj, interligantaj diversajn partojn de l' teritorio.

Antaŭ nia prolet-esperantista armeo aperas la sama tasko: Ni devas, longe batalinte por diversaj "vilaĝoj" kaj "urbetoj"[1]), ekataki la "komunikiĝ-punktojn" de l' Proletaro, la punktojn, kie sidas la "staboj", unuvorte klopodi por akiri la ŝlosilon, kiu malfermu al ni la pordon de l' tutproletara domo...

Se ni deziras, ke proletoj interkompreniĝu, do *unue ni devas pruvi la taŭgecon de esp-o ĉe la organizoj, kiuj reprezentas kolektive diversajn tendencojn aŭ grupiĝojn de l' Laboristaro.* El tia vidpunkto la funkciado de volontuloj-tradukistoj permesos estigi tute alian situacion, kiam ĉe ĉiu grava klasbatalema unuiĝo la interlanda komprenado estos tuj ebligita.

Malgranda parto de l' organizaj direkcioj aŭ sekretariejoj uzas diversajn nacilingvojn, sed ĉie oni estos fulme mirigitaj, observante je kiom esperanto-uzado superas tiun de l' aliaj lingvoj (almenaŭ eĉ pro tio, ke ĝi malfermas la komprenon ne al unu *nura lingvoteritorio, sed al ĉiuj partoj de l' mondo)...* Sed al vortoj oni povas malkredi aŭ malfideti aŭ dubi aŭ ŝanceli aŭ ekkredi... *Do la faktoj parolu per si mem!*

Ni ĉesu propagandi aludante nur la estontan gravecon de esp-o! Oni devas imiti ĉie la ekzemplon de l' sovetia aktivularo, kiu sukcesas, ĉar anstataŭ "mondlingvo por morgaŭ", ĝi proponas "jam pretajn servojn por hodiaŭ". En Sovetio, *kiel propagandilo,* la aktivuloj ĉiam proponas, ke komenctempe (antaŭe ol la propaganditaro scikonu la lingvon) eĉ la traduk-helpo estu havigata de l' esperantistoj...

Ni ne proponas, ke ĉi-laboro estu substituita[2]) al iu alia. Ni tute ne intencas rekomendi, ke oni propagandu nur ĉe la "gvidejoj" anstataŭ agitadi ĉe la laborist-amasoj. Tute ne! Ni nur insiste sugestas, ke ĉi gravega laboro estu unualinie, unuavice aranĝata! Sen ĝi la venko restos malproksime.

En ĉiuj urboj, kie troviĝas gravaj prolet-organizoj — Wien, Berlin, Paris, London, Amsterdam, Moskvo ktp. ktp. ni havas laborkapablan SAT-anaron. Do tio plifaciligas nian taskon. Tio permesas al ni **senprokraste** proponi niajn servojn al ĉiuj tiuj organizoj, kie iu el la K-doj sendube trovos fidon. **La funkciado devas esti komencata!**

Kaj la laboro estas treege simpla:

1. ricevinte la konsenton de l' priservinda organizo, la volontulo sciigas sian adreson al la sekretariejo aŭ direkcio kaj samtempe publikigas la nomon kaj adreson de l' priservota asocio en "S-ulo" aŭ "Jarlibro";

2. la volontulo ne deĵoras konstante; li venas, kiam montriĝas eventuale bezono, laŭ alvokoj de l' organiza sidejo...

[1]) Metafor-sence.
[2]) Substitui = anstataŭi. *Red.*

Faktoj kaj komentoj

Parofia ekspluatado

En malgranda vilaĝo Seget, apud Trogir en Dalmacio, 417 loĝantoj, kamparanoj — pro tiu ĉi jara malbona rikolto — kaj ŝtonlaboristoj, ricevantaj nur 4 dinarojn pohore, vivaĉas en terura mizero. Parofiestro vidante tion, tamen postulas de ĉiu loĝanto 100 din. pojare por hierarĥiaj bezonoj, krom tio pagon por baptado, enterigado kaj 300 din. por edziĝo. Sen tiu pago neniu povas baptigi infanon ktp. kaj dume parofiestro per ĝendarmoj persekutas kaj devigas vilaĝanojn plenumi tiujn "devojn". Tio okazis al K-do J. P. Al vilaĝanoj restis nenio pli ol unuiĝi kaj interkonsente ne baptigi infanojn kaj sen parofiestro enterigadi siajn mortintojn.

Jug. SAT-kor.

Rim. de l' Red. Ne la pastro estas malaprobinda, sed la vilaĝanoj, kiuj bezonas pastron. Multaj homoj ja neniam bezonas la "laboron" de pastro.

La aŭtomobila industrio

(Kelkaj ciferoj)

La franca aŭtomobil-industrio en j. 1926 kreis 190 000 aŭtomobilojn, kiuj prezentis valoron de 7 miliardoj. Per tiu ĉi cifero Francio okupas la unuan lokon en la Eŭropa aŭtomobil-industrio. La aliaj ŝtatoj sekvas jene: Britio kun 170 000, Italio kun 70 000, Germanio kun 25 000 kaj Belgio kun 10 000 aŭtomobiloj.

Sed la tuta Eŭropa aŭtomobil-industrio kompare kun tiu de la Unuigitaj Ŝtatoj prezentiĝas — mikroskope.

En Usono oni konstruis en j. 1926 "nur" 4 480 000 aŭtomobilojn kaj entute troviĝas 22 000 000 da aŭtomobiloj, dum en Francio la sumo ne superas 901 000.

Unuvorte en Usono cirkulas unu aŭtomobilo je 5,4 loĝantoj, en Francio unu aŭtomobilo je 43 loĝantoj. —

La legantoj mem komentu.

Ĉu vi jam renovigis vian membrecon al SAT?

Kaj la peresperanta korespondado sekvigos, ke esp-o fariĝos same kutima viv-aperaĵo, kiel poŝto, telefono, stenografio, k. a. La sovetia sperto pruvas, ke tie, kie praktika laboro estas videbla, la plej teoriemaj K-doj (ne-esp-istaj) ne kuraĝas eĉ diskuti, ĉu "artefarita lingvo" estas vivkapabla...

Multajn K-dojn povas timigi la supozo, ke la nova laboro estus tro laciga. Vana timo! Se laboro ne estos tro multa, do la volontulo sendube ne havos kaŭzon por plendi; se male la esp-aj korespondaĵoj abundege alfluos (kiel tio okazis ĉe Direkcio de "Ruĝa Helpo" germania), la volontula K-do havas plenan rajton eluzi ĉi atenditan momenton, kaj postuli, — ĉar la laboro plu ne estas plenumebla post lia panakira laboro, — ke: Aŭ iu el la oficistoj de l' organizo ellernu la mondlingvon aŭ oni enoficigu K-don, kiu ĝin scipovas. Sed ĝuste tion mi ne povas postuli nun, kiam la faktoj ne estas ankoraŭ observitaj de l' gvidantaro mem.

La sistemo de volontula tradukado estas la *neevitebla* historia ŝtupo por transiri al tiu periodo, kiam esperanto estos la nepra lingvo por la interrilatoj de l' prolet-asocioj.

Kaj se en j. 1928 ĉiu grava internacia, landa aŭ regiona prolet-organizo, figuros en nia Jarlibro, sub la speciala rubriko, ni povos fiere konkludi, ke ni ekstaras ĉe la sojlo de l' definitiva triumfo! La ĉiopova martelo por forĝi la ĉenon de l' sukcesoj kuŝas en niaj propraj manoj: ĝi estas la scikono de esperanto. Aktivuloj, ni ataku la fortikaĵojn!

Antaŭ la fino de ĉi-jaro ĉiu el vi sin demandu:

"Ĉu mi jam priservas mian centrejon? Ĉu la adreso jam estas sciigata por Jarlibro 1928? Ĉu nia esp-a grupo povas ankoraŭ ion fari?" *Dneprano.*

La Direkcio de SAT tre insistas, por ke ĉiu leginto de supra artikolo ekkonsciu ĝian gravecon kaj trafecon. Plenumu la deziron de la verkinto. Ne prokrastu fari tuj la necesajn klopodojn.

*

"NEK EN KORO, NEK EN KAPO RESTAS IO"

Mi devas skribi ĉi-tion pro la ofte ripetiĝantaj okazoj, dum kiuj oni tute nepardoneble evitas uzi esperanton. Pro tio, certe, malgajnas nia propagando. Mi aludas al la eksterlandaj delegacioj, venantaj en Sovetion. Nian urbon vizitis kelkaj delegacioj, en kiuj troviĝis esp-istoj. Kaj tamen ĉi-gekamaradoj eĉ per unu vorto ne sciigis la lokan SAT-grupon pri sia alveno. Kaj ni sciiĝis pri tio-ĉi nur tute hazarde. Povas esti, ke en kelkaj okazoj ni eĉ tute ne scias, ke en iu delegitaro troviĝas esp-istoj. Mi ne komprenas, per kio motivigas sian silentadon la Gek-doj-esp-istoj, anoj de tiaj delegacioj. Ĉu nur pro malbona scio de esp-o? Tia motivo tute ne taŭgas. Ja ne estas necese fari grandan paroladon. Kaj la vizitantaj nin Gek-doj-esp-istoj tre bone akcelus la progreson de nia movado, se ili kelkloke oratorus. Ja tio estas tre facile plenumebla: necesas nur sciigi per poŝtkarto, ke inter tiu kaj tiu delegitaro "troviĝas ni — esp-istoj"...

Nun mi montru, kion ni perdas pro tia facil-anima sintenado de niaj "samideanoj". La 2. 11. 27 nian fabrikon vizitis germana delegacio. Okazis 20-minuta kunveno. Ĉiuj tre entuziasmiĝis. La "interfratajn" parolojn tradukis oficiala tradukistino. La entuziasmo ŝajne parencigis 6 germanojn kun pli ol 700 rusoj. Sed kiam oni okupis siajn lokojn por daŭrigi la laboron, mi interalie aŭdis: "povas esti, ke la germano nin insultis kaj ni lin aplaŭdis". Kiam la delegacio tramarŝis la diversajn metiejojn de la fabriko, min "helpis" la trijara lernado de la germana lingvo — mi demandis: "Genossen, sprechen Sie esp-o?" (Gek-doj, ĉu vi parolas esp-e?). Unu el ili nee respondis al mi. Tiam mi "deklaris": "ist schlecht" (estas malbone). La K-do ion daŭrigis. Mi svingis la manon kaj diris esp-e: "nu, mi nenion komprenas". La K-do, kompreninte, ke mi ne plu scipovas la germanan lingvon, foriĝis. Al mi de ĉiuj flankoj flugis demandoj de la ekscitiĝintaj kolegoj: "kion vi diris", "kion vi interparolis", "kion li respondis", "ĉu estas"... ktp. Mi konfuze devis respondi, ke ni ne komprenis nin, ĉar inter ili ne estis esp-istoj. Denove komenciĝis ironiaĵoj. Eĉ unu K-do diris, ke "krom la unuamomenta entuziasmo nek en la koro, nek en la kapo restas io". Sed ja tute alie ni sentis nin dum kaj post la vizitoj de esp-istoj-gek-doj, ekz. post nia VI-a en Leningrad. Tiam laboristoj, partoprenintaj niajn kunvenojn, tre vigle interesiĝis kaj multon demandis. La supre notitaj de mi faktoj montras, ke efektive esp-istoj-gek-doj lasas senutile okazojn por fortika interfratiĝo.

Do, el ĉi-tio, karaj "sennaciuloj" (?!), ni vidas, kiom gravajn okazojn ni perdas por eduki vere sennacian senton ĉe la laborularo kaj por propagandi nian movadon. Ĉu pro senbaza timo?...... maldiligenteco?... nepripensiteco... aŭ pro kio?

N.-Novgorod, 20. 11. 27. *V. Piskunov* (5432).

*

La laŭprofesia statistiko de la SAT-anaro

Nia ĉiujara Jarlibro estas kvazaŭ entutigo de la jara penado de aktivaj SAT-anoj por esperanto. Sed, se la Jarlibro vere spegulas la nombran kreskon de nia Asocio, en ĝi tamen mankas la bildo de eca stato de niaj fortoj. Ni ne povas ekvidi, kia proletara falango plej multnombre partoprenas nian movadon kaj kia ete aŭ eĉ tute forestas inter niaj vicoj. Krome, la komencantan korespondonton ĉiam interesas la demando, ĉu li ricevos laŭ sia anonco respondon de ia samfakano aŭ samprofesiano. Tial mi opinias, ke la Jarlibro devas enhavi ankaŭ laŭprofesian statistikon de la SAT-anaro. Tiun laboron mi jam plenumis por la jaro 1927, kaj mi ankaŭ intencas fari la samon por la venonta jaro. Pro sia amplekso la rezultoj por la nuna jaro ne povas esti publikigataj, sed ĉiu interesemulo povas ilin ricevi senpere de mi. (USSR, Kazakstan, Turtkul, A. Jadlovker.)

Nun mi nur volas atentigi la Gek-dojn, ke ili bonvolu sciigi al mi sian profesion kiel plej precize, ĉar estas tute nesufiĉa la vorto "laboristo", "fabriklaboristo" aŭ eĉ "tornisto", "teknikisto" aŭ "oficisto". Nepre indiku ankaŭ la branĉon, en kiu vi laboras aŭ oficas. Tiuokaze ni esperas, ke la 7-a Jarlibro enhavos materialon, interesan por ĉiu SAT-ano.

(6771.)

"FERA GVARDIO DE SAT"

Songo de Fergvardiano

Vekiĝinte iun tagon (kompreneble, belegan), K-do Fantaziulo iom da tempo kuŝis en lito kaj kutime revis pri estonteco de la SAT-anaro. Subite eksonis sonorilo. Li eksaltis, malfermis la pordon kaj ekvidis leterportiston.

— Jen, prenu! — diris la leterportisto solene, donante iun belegan gazeton.

K-do Fantaziulo prenis la gazeton kaj mirigite rigardis ĝin: de kie do povas esti tia belega gazeto? Ĝi estas 48-paĝa, luksa, bonege ilustrita, grandformata. Kaj jen supre staras titolo:

SENNACIULO

Kio do estas? Ĉu miraklo? Aŭ songo? Fantaziulo frotis siajn okulojn — ne, la sama aspekto. Li pinĉis sin — doloras, sekve, li ne dormas.

Li trarigardis la enhavon — ĝi estis riĉega. Interesaj, freŝaj artikoloj el ĉiuj landoj de l' mondo. Belegaj, originalaj ilustraĵoj el la tuta terglobo ktp.

Tiam li tralegis la fruntartikolon — kaj ĉio klariĝis.

"De nun — skribis la Redakcio — ni jam povas eldoni vere tutmondan organon, perfektan interligilon de l' tutmondo. De nun nia gazeto fariĝas ĉefa fonto, krono de tuta nacilingva gazetaro. Tio, kio antaŭ tri jaroj ŝajnis esti fantazio, nun jam estas realo. La nombro de la "fantaziemuloj" (kiel komence oni nomis ilin) atingis jam..., kaj tio donis bazon por ĉi tiu paŝo. Kaj proksimiĝas la tempo, kiam..." *Iuelili.*

K-do **Lvov** (Zinovjevsk) "brikojn" por sept., okt., nov. k. dec. = 4,— rubl.

K-do **Lakov** (Sadovec) pagas 45,— lev. b. por la jul.-, aŭg.- k. sep.-brikoj.

Ĝojvivulo (Nadeĵdinsk) pagas 9,— rubl. por la monatoj aprilo ĝis decembro 27.

K-dino **Vasiljeva** (Iv.-Voznesensk) pagas 5,— rubl. por oktobro ĝis marto 1928.

*

Jubileo-Ĉeno[1)]

Morrell (Barcelona) 2,30 mk.; **Ruĝa Helpo Orient-Saksio** (Dresden) 10,— mk.; **Lidin** (Moskvo) 3,— mk.; **Hejtilmuntisto** (Paris) 50 fr. fr.; **Krasnopolskij** (Vasiljevskoje) 1,25 rubl.; **Catz** (Braila) 30 lej.; **Hejda** (Wien) 2 ŝil. aŭstr.; **L. M.** 1,50 mk.; **Cowan** (Douglas) 2/- ŝil.; **Kuorikoski** (Lauttakylä) 2,50 mk. fin.; **Lehtinen** (Lauttakylä) 5 mk. fin.; **Valluch** (Orleans) 2 fr. fr.; **Je la nomo de Bransbury** (Leningrad) 6,80 fr. b.; **Wanak** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **Guhr** (Seifhennersdorf) 1,45 fr. fr.; **Sulsky** (Harpenden) 2/- ŝil.; **Rolo** (Leipzig) 5,— mk.; **Wagner** (Pasing) 1,— mk.; **Ŝibajev** (Smolensk) 1 rubl. laŭ alvoko de Falkowski (Essen), alvokas Grübel (Halle) k. A. Johansson (Larje); **4227** — 1,— mk.; Zinke (Rottluff) 5,— mk.; **iu nokto** (Moskvo) 4 rubl.; **Beranek** (Wien) 4 ŝil. aŭstr.

1) Vidu n-on 100 de "S-ulo".

Ju pli da abonantoj havos SENNACIULO, des pli da potenco havos SAT.

Abonu kaj abonigu ĝian organon, se vi sincere kaj inteligente deziras la prosperon de la Laborista Esperantista Movado.

A. I. Z.

El diversaj lokoj ni ricevas leterojn en kiuj esp-istoj esprimas sian malkontenton pro tio, ke AIZ. ankoraŭ ne plene enkondukis esp-on. Kelkaj eĉ skribis pri trompo flanke de la Red. Necesas klarigo. Ni nur post grandaj penoj atingis, ke AIZ. havas paĝojn: "El tuta Mondo" k. la "Sportan Paĝon" en esp-o. Se iam unu el tiaj paĝoj forestas en iu numero, do ankaŭ forestas tiufoje la esp. klarigoj de la koncerna paĝo. Ni penos kompreneble atingi pluajn paĝojn k. ni esperas sukcesi, *se* la esp-istoj *subtenos* nin per alsendo de koncernaj petoj, k. per propagando por AIZ.

Nia propaganda entrepreno por esp-o en formo de *senpaga* dissendo de "aranĝoj" el novaj 7 n-oj de AIZ. (Esperantopaĝoj) bone sukcesis. Ni dissendis jam pli ol 100 "aranĝojn" al la grupoj. *Mendu tuj!* Per tio vi efike propagandos por esp-o k. por **A. I. Z. Esperanto-Fako de Neuer Deutscher Verlag, Germanio, Berlin SW 8, Wilhelmstr. 48.**

*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Sovetio. — En la P.T.T.-kontoro de *Arĥangelsk* gvidanto de esp-rondo, K-do Erjuĥin organizis esp.-ekspozicion. Oni povis trovi esp. tabelojn, Zamenhofan portreton, korespondaĵojn el Eŭropo k. Ameriko kun klariga priskribo sur aparta paperfolio. Sur tablo kuŝis diversaj gazetoj inter kiuj kompreneble *"S-ulo"*, *"La Lernanto"* k. *"S. Revuo"* k. multe da literaturaĵoj. Krom tio sur paĝoj de la murgazeto *"Naŝ bit"* (Nia moralo), organo de poŝtista profesia laborkomitato, estis presitaj tradukoj el ricevitaj eksterlandaj leteroj-gratuloj okaze de la *Oktobra Festo* k. ruslingva artikolo s. t. "Al Internacia Ligo". — *Barnaŭla* gazeto *"Ruĝa Altajo"* eldonis esp. folieton, kompl. gramatikon k. du Limuojn. Prezo nur po unu kop. Ankaŭ aliaj gazetoj k. ĵurnaloj estas tre favoraj k. presigas ne nur la alvenantajn gratul-leterojn, tradukojn el *"S-ulo"*, sed ankaŭ multe da favoraj notoj. Sekve multaj kursoj ĉe ĉiuj preskaŭ metiistaj organizoj k. lernejoj. — En *Ivanovo-Voznesensk* rekomencis ŝtataj esp.-kursoj kun pli ol 50 lernantoj. En januaro okazos Esp.-Konferenco de RSFSR.; dezirataj estus multaj salutoj de aliaj organizoj. — En *Novosibirsk*'on venos *K-do Bajenov* por propagandi esp-on.

Ĉe la neŭtraluloj.

Scienculoj aplikas esperanton

Antaŭ nelonge la Universitato de Nagasaki (Japanio) sendis Prof. D-ron Hazime Asada al Eŭropo, por fari enketon pri la div. metodoj de la aplikado de jurmedicino. Li jam faris paroladojn en esp-o en div. urboj de Eŭropo kaj estas ravita pri la rezultoj. Sekcia ĉefo de l' japana Trafika Ministerio, Profesoro D-ro Ostala faris la saman eksperimenton en Eŭropo kun la sama sukceso.

Esperanto en la instruado

La Instituto Meschini, havanta lernejojn en ĉiuj urboj de Italio, metis esp-on en sian programon. La rekomendo farita por dekreto speciala de l' Prusa Ministerio de Publika Instruado en 1922, la reform-realgimnazio de Sprottau en Silezio enkondukis la instruadon de esp-o en la tri superajn klasojn. La Popola Komisario Armena en Erivan (Armenio) permesis la enkondukon de esp-o en ĉiuj superaj klasoj de la perfektigaj lernejoj.

La turismo kaj esperanto

La oficejoj de turismo daŭrigas publikigi prospektojn ktp. en esp-o. Lastatempe la urboj de Budapest, Albertville (Alta Savojo) Banurbo Norderney (Germanlando), Padova, Köln (2-a eldono), Wiesbaden (2-a eldono), Zutphen (Nederlando) eldonis gvidlibrojn en esp-o. La Turisma Centro "ĉedok" en Praha faris same por konigi en eksterlando la regionon de l' Tatro. *Laŭ I. E. S.*

Grandaj progresoj inter la saksa instruistaro

La Asocio de Saksaj Geinstruistoj tre vigle laboras. La nombro de la membroj kreskis je 60 % dum 10 monatoj. Propagandaj paroladoj okazis en multaj distriktaj instruistaj asocioj, dum la lasta semajno en Geringswalde, Limbach kaj Freiberg. Paroladoj por la instruistaro en Mittweida, Zittau kaj Nossen sekvos.

ATENTU!

Junulgrupo dez. koresp. kun ĉiul. gejunuloj pri "ekonomia mizero de la junularo". Skribu plej rapide. Resp. garantiata.

Adr.: **K. Schördling,**
General-Bülow-Strasse 2,
Leipzig, O 29 (Germanio).

Gekamaradoj!

Por pliviglígi nian grupan vivon, skribu al ni pri viaj vivmaniero, kutimoj, esperanto- k. lab. movadoj, pasigo de libertempo k. s. Skribu tiel, ke ĝi montru la realecon k. estu interesa. Ni certe resp. al ĉiuj.

Adr.: **Hungaria Esp. Soc. Lab.** 1-a grupo.
Budapest VIII., Jòzsef-körut 9. I. 3.,
(Hungario).

For la senlaboreco!

Komerco kun ĉiuj najbaraj landoj en ĉiuj eblaj aferoj. Por respondo necesas sendi PK kun respond-kupono: Skribu al K-do **V. d. Bulcke Geo.** (SAT-ano 8097), Spinners-str. 2, **Gent** (Belgio).

ATENTU! ATENTU!

Eldonaĵoj de Internacia Socia Revuo

Malmultekosta literaturo — Inkluzive afrankon!

Kiel estas konate ekzistis antaŭ la milito esperanta socialista organo **"Internacia Socia Revuo"**. La administracio de ISR ankaŭ aperigis serion da eldonaĵoj en esperanto. Ĉi tiuj eldonaĵoj nun estas aĉeteblaj ĉe la Adm. de SAT, je tre malaltaj prezoj. Ĉiuj broŝuretoj eĉ havas historian valoron en la esp. movado. Tuj mendu! — Jen la plena kolekto:

	Prezo:	
1. **La evangelio de la horo,** de Paul Berthelot, 24 pĝ.	0,15	mk. g.
2. **Kio estas socialismo?,** parolado de E. Ferri, 32 pĝ.	0,20	„
3. **Pri la esenco de konstitucio,** parolado de F. Lassalle, 30 pĝ.	0,20	„
4. **La piramido de tiranio,** de F. D. Nieuwenhuis, 32 pĝ.	0,20	„
5—6. **La reforma mono de Silvio Gesell,** parte orig., 48 pĝ.	0,25	„
7. **Por ataki kaj defendi,** parolado de W. Liebknecht, 32 pĝ.	0,20	„
8. **La salajro,** de P. Kropotkin, 22 pĝ.	0,15	„
9—17. **La mizeruloj (I),** de Victor Hugo (fama verko) 248 pĝ.	1,20	„
18. **La forto de la fortaj,** de Jack London, 20 pĝ.	0,15	„

Ĉiuj naŭ numeroj kune, esceptite "La Mizeruloj" kostas 1,— mk. g.

Krome ni posedas ankoraŭ malgrandan kvanton da:

Krimoj de dio, de S. Faure, 32 pĝ. . . . prezo: **0,20** mk. g.

Eluzu la okazon! **Tuj mendu!**

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Atentu, eksterlandaj Gek-doj!

Kiuj el vi intencas viziti printempe Germanion, ne forgesu viziti la inaŭguron de nia grupstandardo, la 4. marto 1928. Nia laborema membraro esperas kontentigi ĉiun per ĝuoplena tago.

Laborista Esperanto-Grupo "Ni estu fratoj", Nowawes (Germ.)

ENHAVO:

Problemoj el Hindio, trad. 8500 pĝ. 81
Ankoraŭ pri "Mother India", de E.K.L. . . . „ 82
La vera minaco de la hindoj . . „ 82
La Kinoaŭtomobilo, trad. Kolektivano . . . „ 82
Mia buĝeto, de 9682 . . . „ 83
Tago el mia vivo, de 7382 . . . „ 83
La ekonomia situacio en Bavario, trad. Milok centdek . . . „ 84
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, de E. Lanty . . „ 84
Preseraroj, de E. L. . . . „ 85
Situacio de la macedoniaj tabakkulturistoj . . . „ 85
Legendo, trad. Marceau . . . „ 85
Faktoj kaj komentoj, de Jug. SAT-kor. . . . „ 86
La aŭtomobila industrio . . . „ 86
Tra Esperantio . . . „ 86—88
Anoncoj . . . „ 88

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)